


La Espero

2000:4

UK 2003 i Göteborg

Nedräkningen har börjat



På www.esperanto.se finns redan en räknare som talar om hur många dagar som återstår till världskongressen i Göteborg 2003. Bilden är tagen den 30 augusti. 1060 låter mycket, men dagen 0 kommer fortare än vi anar.

Det blir UK i Göteborg år 2003. Det meddelade UEA:s styrelse den 1 augusti under avslutningen av årets UK i Tel Aviv, Israel. Som inbjudare står Svenska Esperantoförbundet och Göteborgs esperantister. Kongressen – som beräknas samla 2500 till 3000 deltagare – kommer att äga rum 26 juli – 2 augusti 2003.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
 Septembro 2000 • 88-a jarkolekto
 Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
 Janko Luin (layout)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvareg utgivare: Leif Nordenstorn

Utförning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 2000: 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
 Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
 tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2000:

Direktansluten medlem 180 kr.
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
 Hel familj 270 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 90 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
 Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

Manusstopp den 15/10

Manus till La Espero

sänds till Jan Setréus
 Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

telefon/fax: 08 - 717 75 67

e-post: jan.setreus@spray.se

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Ne ĉiuj kune

Pli ol unu fojon mi aŭdis esprimite, ke esperantisto, kiu ne ofertas konsiderinde da peno kaj mono por esperanto, ne estas vera esperantisto. Se tiuj "veraj esperantistoj" sukcesas disvastigi esperanton al persono, kiu opinias ĝin bona kaj simple volas uzi ĝin, tiu nova esperantisto ne estas "vera esperantisto". Oni, inkluzive de li mem, ricevas impreson, ke li estas malplivalora balasto. Kia absurda ideo! Kvazaŭ estas forgesite, ke la celo estas, ke ni klopodu por fari esperanton tiel alloga, ke homoj volonte ĝin lernu eĉ sen idealismaj motivoj. Estus bonege, se oni povus aniĝi, utili kaj senti sin hejme en la esperantomovado, eĉ se oni ne havas la ambicion, ke esperanto estu ĉies dua lingvo. Nun tiel pensi estas kvazaŭ blasfemi en preĝejo.

Franko Luin ne esprimas sin draste en sia ĉi-gazeta gvidartikolo, sed lia argumentado, ke ĉiuj esperantistoj devas membriĝi en unu sola idealisma organizaĵo, estas simila kaj povas facile alianciĝi kun la supremenciita sinteno. Tio povas el interne korodi la tutan ideon de internacia lingvo, kiu havas nenion komunan kun tiu aŭ alia membreco en organizaĵo. La organizaĵoj povas veni kaj malveni, sed la lingvo, espereble, transvivos kaj supervivos ilin ĉiujn. Kial ne rilati pozitive al la fakto, ke kelkaj homoj eble volas lerni esperanton, kaj eble eĉ organiziĝi, pro aliaj motivoj ol fariĝi "pacaj batalantoj"?

Krome Franko pledas por tio, ke ĉiu aktivado por esperanto okazu en unu sola organizaĵo. Tio povas havi du malsamajn signifojn.

Ĝi povas signifi, ke la nunaj organizaĵoj reduktiĝu al unu sub unu estraro kaj kun unu ekonomio. Sed ĉu ne estus stulte meti ĉiujn ovojn en unu korbon? Kiel aspektu tiu estraro, kiu dum siaj kunsidoj devas pritrakti la riparojn kaj investojn en Esperanto-Gården, la tieajn somerkursojn, la eldonadon de libroj, ĉiujn aktivecojn de SEF ktp? Tio eblus, se ni havus profesian, salajratan estraron, alie ne. Kaj se unu el la aktivecoj ekonomie kolapsus, ĝi tirus ankaŭ la aliajn en bankroton. Alivorte, tia reduktio estus tre malprudenta paŝo.

Ĝi ankaŭ povas signifi, ke la organizaĵoj restu apartaj kiel nun, sed nur unu el ili aperu oficiale kaj publike. Ĉiu aktiveco okazu en ĝia nomo. En tiu kazo ni demandu nin, ĉu ni volas mensogi kaj kion ni gajnos per tia mensogado. Kompreneble ne ĉiuj volas mensogi, kaj jam tio naskus konfliktojn inter mensogantoj kaj nemen-

sogantoj.

Ne, SEF, Eldona Societo kaj Esperanto-Gården estas tri distinge apartaj eroj de la sveda esperantomovado, ĉiu kun siaj estraro, ekonomio kaj taskoj kaj ĉiu el ili devas respondi pri sia agado. Oni absolute nenion gajnas per reduktio aŭ kamuflado.

Tio ne devas malhelpi, ke ili, ĉiu suverene kaj egalrajte, povu harmonie kunlabori sub unu komuna rubriko.

Bertil Nilsson

Jes, kune

Mi ne komprenas, kion la vorto "kune" signifas al Bertil Nilsson. Li ŝajnas interpreti ĝin tiel, ke ni ĉiuj devus surpreni la samajn ŝuojn kaj ĉapojn. Tiel kompreneble ne estu.

Mi neniam pledas, "ke ĉiu aktivado por esperanto okazu en unu sola organizaĵo", kiel Bertil skribas. Se la esperantistoj havas bezonon de specialaj servoj, tiam specialaj unuoj prizorgu tion. Ĉu tio estas societoj, entreprenoj kooperativaj aŭ akciaj, tio estas demando de diversaj cirkonstancoj. Kompreneble ekzistu eldonejo, kies tasko estas eldoni librojn. Kaj kompreneble ekzistu aparta organiza strukturo por gvidi Esperanto-Gården.

Somere oni ekdiskutis en Svedio novan agadon, por kiu taŭgus memstara organiza formo. La estraro de SEF ĝuste nun rigardas, kiel helpi, por ke tiu ideo realiĝu. Ĉar estas bezonataj specialaj konoj kaj rimedoj por tio (pardonu min, ke mi rezonas nur abstrakte, sen mencii pri kio temas), tio ne estas tasko por SEF. Sed SEF povas kunhelpi, tiel ke ni realigos tion kune. Jes, kune. Simile, kiel la realigo de Esperanto-Gården, komence ideo de unu persono, povis realiĝi, ĉar ni kunigis niajn fortojn – certe ne speciale grandaj ĉiu por si mem – kaj sukcesis en projekto, kiu je la unua pritrakto ŝajnis tute fantazia.

Se ni agas kune ankaŭ je la idea nivelo – la nivelo, je kiu SEF agas – ni povas ankaŭ multon pli atingi. Se ni estus centmiloj da organizitaj esperantistoj en Svedio, ni povus facile havi plurajn landajn organizaĵojn. Tiom multaj ni ne estas. El tiu perspektivo mi ne vidas pravigon por pli ol unu organizo, kadre de kiu laboru memstare diversaj grupoj kaj sekcioj.

Franko Luin

Unuafoje en Israelo

Ĉi tio estas rapida raporto pri la ĉi-jara UK. En venonta numero de La Espero Gunnar Gällmo rakontos pri siaj personaj impresoj de la kongreso.

Tel-Aviv – Monto de printempo – urbo kun varmega vetero kaj tre humida aero, ne simila al printempo.

Estas facile kompreni, kial nur 14 svedoj libervole elmetis siajn frostklimatizitajn korpojn al tia tropika varmo. Entute aliĝis 1205 personoj, kio estas nur duono de averaĝa nombro. Alia malavantaĝo, krom la vetero, estis la prezoj en butikoj kaj restoracioj, duoblaj kompare kun Svedio. Laŭ statistiko Tel-Aviv estas inter la plej altprezaj urboj en la mondo, sur la oka loko.

Inaŭguro merkrede

Post partopreno en 27 pli fruaj kongresoj, mi kaj ĉiuj aliaj kutimiĝis al sabata komenciĝo kaj dimanĉa inaŭguro. Ĉi-foje la komenciĝo okazis marde kun inaŭguro merkrede. Tio havis pozitivan rezulton rilate partoprenon de ambasadaĵ reprezentantoj. Por ili estis pli facile aperi en la kongreso, ĉar estis normala labortago. Dek ambasadoj estis reprezentitaj.

Venis mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kiel kutime ek de 1997, kiam Kofi Annan transprenis tiun altan postenon. Alia mesaĝo venis de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, ankaŭ bona kutimo. Fine de la inaŭgura programo aperis antaŭ la mikrofono la vico de landaj reprezentantoj kun salutvortoj. Por Svedio salutis Agneta Emanuelsson.

Salonoj kun svedaj nomoj

Por honori konatajn esperantistojn postmorte, oni donas nomojn de tiaj personoj al diversaj salonoj. Du svedoj estis honorataj ĉi-foje: Jan Ströme kaj Ingemund Bengtsson.

Komitato, la parlamento de UEA

La prezidanto de UEA Kep Enderby kaj la vicprezidanto Renato Corsetti dividis la laboron gvidi la kunsidojn. Du svedaj komitatanoj, Roland Lindblom kaj Agneta Emanuelsson, partoprenis. Franko Luin estas elektita komitatano, sed li ne povis veni al Tel-Aviv. Agneta Emanuelsson pro tio anstataŭis lin.

Pli da svedaj nomoj

Sten Johansson denove gajnis unuan premion en Belartaj Konkursoj, ĉi-

jare pro sia esejo pri Stellan Engholm. Gunnar Gällmo kaj Agneta Emanuelsson aperis en programero "Aŭtoraj duonhoroj", Gunnar pri sia libro *Mokrokvalvo*, Agneta pri sia libro pri Valdemar Langlet.

Micke Englund el Stockholmo paŝis sur la scenejon kun sia gitaro, kiam lastvespere okazis la programero "Internacia vespero". Li estis ŝanĝinta la originalan tekston kaj adaptis ĝin al la situacio en Israelo.

Sven Linnér el Upplands Väsby, kies hobbio estas kantado en korusoj, partoprenis en la tradicia kongresa koruso, ĉi-foje kun nova estro, Jelena Puhova el Rusio. Laŭ mi ŝi bone sukcesis, ĉar la koruso sonis en miaj oreloj pli bone ol iam antaŭe.

Alta protektanto

Shimon Peres, ministro kaj Nobelpremiito de paco, estis la Alta protektanto. Fine de la kongresa semajno okazis elekto de prezidento de Israelo en la parlamento. La ĝenerala publiko firme kredis, ke Peres estos la nova prezidento, sed pli multaj parlamentanoj voĉdonis por Moshe Katsav. Por la esperantistoj tio ne kreis grandan perdon, ĉar la ministro Katsav estis membro de la Honora komitato de la kongreso.

Göteborg kongresa urbo 2003

LA UEA-estraro faris decidan en kunsido dum la semajno, ke Göteborg estos konvena loko por kongreso. Estis Märtha Andréasson, kiu antaŭ kelkaj jaroj proponis al la esperantistoj en Göteborg, ke Svedio denove invitu al Universala Kongreso. La dua paŝo okazis en 1997, kiam reprezentanto de la SEF-estraro estis invitita al vizito kaj kunsido en Göteborg.

La "lokomotivo" Märtha malsaniĝis kaj la kuracaj metodoj ne sufiĉis por savi ŝian vivon. La laborgrupo daŭrigis sian laboron kun Christer Lörnemark kaj Andreas Nordström kiel ĉefaj gvidantoj. Osmo Buller por UEA kaj Roland Lindblom por SEF renkontis la gvidantojn en Göteborg meze de aprilo ĉi-jare. Osmo Buller raportis poste al la UEA-estraro. SEF komprenis, ke estas tempo sendi oficialan invitleteron – kaj la rezulton vi nun vidis.

Roland Lindblom

Belartaj konkursoj

La jaro 2000 ne provizis escepton al la regulo, ke la nombro de verkoj senditaj al la Belartaj Konkursoj de UEA rekte rilatas al la grandeco de la tiujara Universala Kongreso. Post la kvante kaj kvalite bonrikoltaj Montpeliera kaj Berlina jaroj, respektive kun 118 kaj 102 konkursaĵoj, en la Tel-Aviva jaro la juĝantoj devis taksati entute 69 konkursaĵojn.

La premiolisto aspektas nekutime. En poezio kaj prozo, la bazaj branĉoj de la Konkursoj, la ĵurio trovis nur po unu premiindan verkon, ambaŭ tamen meritajn por la unua premio. Aliflanke, en la esea kaj kanta branĉoj, kiuj en pasinteco ofte spertis jarojn kun neniu aŭ malmultaj premioj, la rezulto ĉi-foje estis rimarkinda. En la esea branĉo ĉiuj verkoj ricevis premion aŭ honoran mencion, kaj en la kantobranĉo la unua premio estis asignita egale al du kantoj de sama aŭtoro.

La sola branĉo, kiu altiris pli da konkursaĵoj ol en la antaŭa jaro, estis tiu de infanlibroj. Partoprenis ses libroj eldonitaj en 1999. Tiu nombro ĝojigis la juĝantojn, el kiuj unu tamen domaĝis la nepremiitajn librojn, ĉar lau li en malpli abunda jaro pli-malpli ĉiu el ili estus povinta gajni la premion...

POEZIO

1-a premio: Mikaelo Gišpling (Israelo) pro "Neĝa fantazio"

PROZO

1-a premio: Julia Sigmond (Rumanio) pro "Mi ne estas Mona Lisa"

ESEO

Premio "Luigi Minnaja": Sten Johansson (Svedio) pro "Kiel legi – ĉu legi – Stellan Engholm?";
2-a premio: Nikola Rasic (Nederlando) pro "Digrafio: speciala kazo de rilato inter lingvo kaj skribo";
3-a premio: Sten Johansson pro "Belartaj Konkursoj de UEA 1950-1999"

INFANLIBRO

Premio "Infanlibro de la Jaro 1999": "La avo en la ĉareto" de Gudrun Pausewang, tradukita el la germana kaj eldonita de Nora Caragea (Germanio).

Esplanado resonis Esperante

Dum tuta semajno ĉi-somere Helsinko estis ne nur unu el la naŭ ĉi-jaraj kulturaj ĉefurboj de Eŭropo, sed la nekontestebla ĉefurbo de Esperanto-kulturo en la tuta mondo. Tie nome okazis la sepa Kultura Esperanto-Festivalo, aranĝo plejne dediĉita al kulturo kreita kaj kreata originale en Esperanto.

Se iu loko estas kvazaŭ la somera koro de Helsinko, tio devas esti la Esplanado, la verda kaj tradici-saturita promenejo inter la Sveda Teatro kaj la Bazara placo.

Kaj ĝuste tie, sur la estrado rekte antaŭ la fama Kapela restoracio kaj je nur ŝtonjeta distanco de la ne malpli fama figuro de Havis Amanda, unu fruan julian vesperon triumfe dissonnegis kantrefreoj esperantaj.

Dum preskaŭ tri horoj la promenantoj kaj la terasaj biertrinkantoj en la ĉiam vigle vizitata parko povis ĝui sinsekvajn koncertojn de ne malpli ol tri el la plej elstaraj nun aktivaj Esperanto-ensembloj: Jomart kaj Nataŝa, Persone kaj Dolcxamar.

Tiu koncertaro en medio publika kaj prestiĝa ja estis nur unu inter konsterna multego da programeroj dum la Kultura Esperanto-Festivalo okazinta en Helsinko inter la 17-a kaj la 23-a de julio.

Sed ĝi estas frapa ekzemplo de la organiza lerto, iniciatemo kaj aŭdaco, kiuj karakterizis tiun ĉi unuan Finnlandan KEF-on kaj faris el ĝi la senkompare plej varian kaj sukcesan el ĉiuj sep okazintaj ĝis nun.

Kiel festivalejo servis la urbofinan-

Dum ĉiu el la sep festivalaj tagoj okazis pluraj artistaj prezentoj diversgenraj. Krom tio la festivalanoj povis elekti inter kapturiga nombro de seminarioj kaj prelegoj literatur- kaj kulturtemaj, aŭ mem ekzerci siajn kapablojn en laborgrupoj pri teatro, verkado, komiksdesegnado, kantado, dancado aŭ rolludado.

Kadre de la muzika programo ni revidis plurajn malnovajn KEF-konaĵojn.

La kantduopo Jomart kaj Nataŝa (Svedio) ĉi-foje levis sian karakterizan kombinaĵon de melodia raveco kaj elektre intima publikkontakto al ankoraŭ pli alta nivelo de rafino, dum la veterana rokbando Persone (Svedio) malavare demonstris la vaston de sia gamo, prezentante eĉ du tute malsamajn plenformatajn koncertojn dum la semajno — unu akustikan kaj unu amplifilan — ambaŭ kun pluraj novaj kantaĵoj.

La Dana-Bosnia-Pola bando Esperanto Desperado revenis en nova konsisto kaj taksis riĉe densan sonapiŝon de etno-roko onde ritma kaj nezisteble danciga.

Kaj post plurjara foresto reaparis Juhani Haavisto (Finnlando/Svedio), iama klavariŝto de Amplifiki, nun debutanta kiel solartisto kaj evidente tuj trafanta en la korojn de la publiko per siaj memkomponitaj kantaĵoj 1970-jarecaj.

Sed surpodiĝis ankaŭ pluraj muzikaj talentoj neniam antaŭe prezentitaj KEF-kuntekste.

Mihaĭl Povorin (Rusio) estas en sia hejmlando jam de longe alte taksata kiel kantverkisto. Nun ankaŭ la KEF-publiko havis ŝancon frandi la fajne nuancitan sentemon fluantan malantaŭ lia simpatie modesta surpodia teniĝo.

La kantisto Paŝa Korotenko (Ukrainio) akompanis sin per gitaro kaj impresis per voĉa ekvilibrismo kaj sursceneja karismo. Sola manko, ja korektebla, estis malklara artikulacio, kiu malhelpis plenan aprezon de la tekstoj.

Sed la ĉiusence plej eksploda KEF-debuto sendube estis tiu de Dolcxamar (jes, ĝi skribiĝas ĝuste tiel!) — la

unua tutfinnlanda rokbanda Esperanta. La kvaropo formas tute novan kaj novstilan konstelacion sur nia muzika firmamento, sed rapide ascendanta — tion ne eblas pridubi post la entuziasmega publika reago al la bonhumore aplomba sinprezento de la bando.

Neniu antaŭa KEF donis tiom da atento al nia originala beletro, kaj la eksterordinara abundo kaj kvalito de la literaturprogramo grandparte dankeblas al la klopodoj de kvar hispanoj — Jorge Camacho, Miguel Fernández, Liven Dek kaj Antonio Valén — kaj unu portugalo — Gonçalo Neves.

Temas pri kvin sesonoj de la tiel nomata Ibera skolo, la verŝajne plej fekunda kaj plurtalenta aktivularo en la nuntempa Esperanto-literaturo, de jaroj vigle kaj kvalite aganta sur la kampoj poezia, fikcia, esea, kritika, polemika, redakta, pedagogia kaj ankoraŭ pliaj.

Ilia grupa partopreno en Helsinko fakte estis okazo unika — onidire ĝis nun neniam renkonteblis same multe da ili samtempe ekster Iberio. Al la festivalanoj ĝi alportis profitan okazon kleriĝi kaj inspiriĝi.

Per longa vico de prelegoj kaj seminarioj la kvin Iberoj ne nur ebligis al ni konatiĝon kun ili mem kaj la diversaj facetoj de sia propra literatura agado.

Ne, ili ankaŭ prezentis leginstigajn enkondukojn al la verkaroj de pluraj aliaj nuntempaj aŭtoroj esperantaj (ekz. Mauro Nervi kaj Mau Zifu), gvidis stimulaĵajn diskutojn pri temoj kiel la naturo de poezio, la kriterioj de serioza literaturkritiko aŭ la verstekniko de Kalocsay, analizis esperantan roklirikon, kundebatis la neceson aŭ neneceson de literaturaj neologismoj kaj organizis spirhaltige belan vesperan deklamprogramon dediĉitan al la esperanta ampoezio. Inter alie!

Sed la Esperanto-literaturo daŭre nutras sin ankaŭ per Nordiaj radikoj. Tion pruvis la sinprezentoj de du nun aktivaj verkistinoj Finnlandevenaj — la poeto Anja Karkkainen kaj la plurfaceta aŭtorino kaj movada aktivulo Sabira Ståhlberg.

Krome la KEF-aj lumjetiloj ĉi-foje trafis eĉ nian grafikan literaturon — en la ĉefa salono pendis la supozeble unua ekspozicio iam ajn dediĉita al la originala Esperanta komiksarto. Per ampleksa kolekto de originaloj tie prezentiĝis tri nuntempe aktivaj de-

"Ĉu vi pretas por la veno de Dolcxamar!?" Novaj esperantaj roksteluloj



cata internacia kulturcentro Caisa tute centre de Helsinko. La celo de la centro estas servi kiel multkultura edukejo kaj renkontejo por homoj Finnlandaj kaj alioriginaj. Kunlaborante kun Caisa la KEF-organizantoj do trovis ne nur bonegan prezentejon sed ankaŭ valoran kaj samspiritan partneron.

Preskaŭa ducento da plentempaj festivalpartoprenantoj el sume 23 landoj ĝuis programon tiel kvante kaj kvalite abundan, ke ĝi serioze defiis la absorbokapablon de eĉ plej ambicia kulturfanatikulo.

Fotoj de Sakari

segnistoj: Niko Vološin (Ukrainio), kies karikaturojn ni okcidentanoj ĉefe konas el Rok' Gazet', Martin Weichert (Svedio), kiu sola en Esperantujo kultivas la konatan ĝenron de unustriaj serĉkomiksoj kun fiksa rolantaro, kaj Arnau Torras Tutsaus (Katalunio), la

de la avangarda kaj nur postmorte aprezata svedlingva Finnlanda poetino Edith Södergran (1892–1923).

La rolon de la poetino ludis Sabira Ståhlberg, kiu mem esperantigis ne nur la nacilingve furorintan teatraĵon sed ankaŭ jam pli frue plenan kolekton de Södergran-pomoj. Helpe de sia kunaktorino Hanna Hjelt ŝi prezentis al ni kunsentindan portreteton de tiu vasta animo kaptita en cirkonstancoj sufoke malfavoraj.

Hipnotige atentokapta estis ankaŭ la dancospektaklo "La hundo lumas", senvorta sed humure poezia, kiun prezentis Kim J. Henriksen (Danio).



Kadre de la festivalo okazis ankaŭ duontaga seminario titolita "Dudek jarojn post Raŭmo – ĉu ni diras ion kulture originalan kaj internacie valoran?" Partoj de la altnivelaj kaj stimulaĵaj kontribuoj de tiu diskuto estas nun legeblaj interrete per la adreso: <<http://www.helsinki.fi/~jslindst/raumo-20.html>>

La KEF en Helsinko do evidente vere elstaris per sia programo kultura, nepre la ĉefa afero.

Sed aldoniĝis ankaŭ multo pli, kvazaŭ bonifike. Menciigu nur preterpase sed apreze la atenta prizorgo de la ĉeestantaj infanoj (kiujn oni eĉ regalis per propra altkvalita kulturprogramo), la bone provizita libroservo, la serio de miniprelegoj pri aspektoj de Finnlanda literaturo kaj kulturo, la ambicie preparita ĉiunokta diskejo sub verva gvido de la diskjokeo kaj rim-mitraleto Gunnar Fischer (Germanio), kaj la duontagaj ekskursoj al ĉelaga saŭnejo kaj la historia fortikaĵo Suomenlinna (svede Sveaborg).

Originala Esperantokulturo ja laŭdifine tuŝas precipe Esperanto-parolantojn. Tiu ĉi KEF tamen sukcesis en eksterordinare alta grado penetri la

konscion de ankaŭ la ne-esperantista Finnlanda publiko.

Artikoloj kaj intervjuoj aperis en tridek da diversaj gazetoj finn- kaj svedlingvaj, inter kiuj troviĝis la du ĉefaj ĵurnaloj Helsingin Sanomat kaj Hufvudstadsbladet. Arangantoj kaj artistoj intervjuiĝis ankaŭ en multaj televidaj kaj radiaj programoj lokaj kaj tutlandaj, el kiuj pluraj estis direktitaj speciale al junulara publiko.

El kvanta vidpunkto la suma raportado laŭtakse eĉ superis tiun de ekz. la UK en Tampere en 1995. Sed ankoraŭ pli grava estas la fakto, ke nia lingvokomunumo nun ne nur rememorigis la eksteran mondon pri sia ekzisto, sed fakte montriĝis per siaj flankoj plej facile alireblaj kaj freŝimpresaj. Rokmuzika kantaĵo, por doni ekzemplon, ja estas tuja kaj tre konvinka pruvo pri la vivanteco de Esperanto – eĉ por tiu, kiu ne komprenas la vortojn.

Resume: La Kultura Esperanto-Festivalo 2000 en Helsinko estis la ĉiurilate pleja ĝis nun. Kaj tion ni dankas al longdaŭraj, skrupulaj kaj amaj klopodoj de la ĉeforganizantino Riitta Hämäläinen kaj granda nombro de aliaj Finnlandaj esperantistoj.

La Finnlanda KEF-teamo transprenis stafete la zorgon pri aranĝo unika en Esperantujo kaj levis ĝin al nivelo tute nova. Ilia festivalo fariĝos la modelo kaj normo, kiun ontaj KEF-organizantoj aspiras atingi.

Imagu elementlernejan instruiston, kiun oni post jaroj invitas al la abiturienta festeno de iama, aparte favorata unuaklasano ŝia. Imagu ŝiajn sentojn, kiam ŝi konstatas, ke el la aminda infano kreskis juna homo bela kaj talenta.

Ion tre similan nome sentis en Helsinko tiuj el ni svedoj, kiuj iam mem kunorganizis KEF-ojn – trakuris nin mikso de ĝojo, fiero, humilo kaj diskreta sed dolĉe larmopreta sentimentaleco.

KEF plenkreskiĝis

Per Aarne Fritzson

Danciga Esperanto-koncerto kore de la Finnlanda ĉefurbo.

grafike brila kaj teme malpudora "subgrunda" satiristo de Esperantujo.

Aliajn aspektojn de la Esperantokulturo prilumis prelego de Vladimir Trifončovski (Bulgario) pri la nialingva teatro, kaj la duparta kaj riĉe sonilustrita superrigardo, kiun donis Flo Martorell (Francio) pri la historio de Esperanto-muziko.

El la kutimaj kampoj de originala Esperanto-kulturo ŝajne nur unu estis malpli ol riĉe reprezentita dum KEF 2000, nome la teatro. Por ŝtopi tiun breĉon, brave elpaŝis du porokaze formitaj amatoraj grupoj.

Unu konsistis el la ĉiam pretaj Iberskolanoj, kiuj sub la nomo "Ibere Libere" prezentis burleske satiran skeĉon verkitan de Goncalo Neves.

La alian, "Variantoj", formis kvin junaj komencantinoj el Helsinko, kiuj kuraĝe entreprenis surscenigon de la primovada satiraĵo "Gastamo" de Spomenka Ŝtimec. La foje ankoraŭ stumblan lingvoregon de la aktorinoj kompensis lerte humura mimiko.

Dum la festivalo prezentiĝis ankaŭ unu vere ambicia teatra projekto, tamen ekster la strikta kadro de originale kreita Esperanto-kulturo. Temis pri la tradukita dramo "Frambodeklivo" de la Finnlanda verkistino Stina Katchadourian, kiu rapide sed kortuŝe skizas la mallongan vivopadon

Laborego de kelkaj preparis feston por multaj. Meze la ĉeforganizantino Riitta Hämäläinen kaj la diligenta preleganto Jorge Camacho senstredigiĝas dum unu el multaj KEF-koncertoj.



Andelsägarna i

Esperanto-Gården

i Lesjöfors ek.för.

kallas till årsstämma
den 11 november 2000 kl. 19.00
på Esperanto-Gården i Lesjöfors.

Styrelsen



Esperanto-festo en Lesjöfors

Venis plej bela festotago – Festo de somermezo – kaj membroj de Esperantoklubo Dalarna decidis solene festi ĝin.

Deko da esperantistoj kolektiĝis en sia Esperantodomo en Lesjöfors, kie ili solene, agrable kaj gaje kune festis la festotagon de la somermezo. En bela, suna vetero en la parko de Esperantodomo en Lesjöfors, kolektiĝis amaso da homoj. Esperantistoj kaj gesimpatiantoj, enloĝantoj de la urbeto Lesjöfors, levis tie bele florornamitan somermezan stangon, kaj ĉirkaŭ ĝi dancis Lesjöfors-anoj kun siaj ĉarmaj, bele vestitaj infanoj, gejunuloj kaj dancamantoj. Kaj Esperantistoj ĝuis la feston, sub milda, somera suno.

Kùn tre bela muziko amuzigis ĉiujn nia sperta muzikisto kaj esperantisto Andreo Berce, jam de longe konata al ĉiuj esperantistoj kiuj jam antaŭe vizitis kunvenojn en Lesjöfors Esperantodomo.

Nek mankis bongusta manĝaĵo, kiun preparis nia sperta kuiristo samideano Lennart Svensson, kiu jam sufiĉe longe prizorgas la hejmon, nian Esperantodomon.

Ni esperu ke ankaŭ esperantistoj de aliaj kluboj kaj lokoj en Svedio sekvos nian ekzemplon, por festi kaj ĝui en nia propra domo Esperantogården en Lesjöfors.

Vera Persson

Esperanto enligte Sveriges Radio

I P1-programmet Tendens forekom esperanto som amne den 27/7. Man talar om esperantos forflutna da det foresprakades med stor entusiasme i demonstrationstaĝ. Men anslaget i programmet blev anda negativot da man tar som utgangspunkt for en intervju med Ingemar Nordin fragan: "Men hur langt ned pa 'utelistan' ligger esperanto idag? Vart har det tagit vagen?"

Nordin namner de mojlligheter till kontakter med folk i andra lander som esperanto ger honom som esperantist, spraket forenar i stallet for att forsvara umgangen. Han forklarar att esperantos storhet ligger i dess forenkla grammatik:

–Ar det inte genialt att ha 10 grammatiska regler? Jag ska kunna lara dig esperantogrammatik pa bara tva timmar.

–Men hur mycket kan man halla pa att forenkla ett sprak innan det blir fattigt?

–Man kan uttrycka sig hur kansligt som helst. Det finns poesi, svenska sanger . . .

I programmet framkommer också att esperantos skapare hade vidare visioner, att kommunikation pa ett gemensamt sprak var en angelagenhet for freden. Nordin menar att denna tanke fortfarande ar levande.

–Men du, idag alltsa, det ar ju fler som pratar engelska och t.ex. mandarin eller kinesiska an esperanto. Ar det inte battre att satsa pa nagot av de spraken?

–Ja, kan du lara dig det? Jag tror inte det! Man ska ga pa det som ar latt, som ar mojligt. Det ar ju mojligt att lara sig esperanto.

–Hur skulle varlden se ut om alla kunde esperanto?

–Jag tror inte att varlden vore nagot annorlunda.

–Men om varlden inte skulle se sa mycket annorlunda ut da, varfor ar det sa viktigt da?

–Det ar jatteviktigt. att kunna kommunicera med varandra, beratta hur man har det. Du kommer ju bort fran missforstandan. De flesta missforstand kommer ju till av att man inte forstar varandra.

Red.

Kultur- kaj Lingvo-Festivalo en Västerås

La festivalo okazos la 11 an de novembro 2000.

Kune kun la organizoj FolkeNs Park kaj ABF, VEK nun estas preparanta ĝin. Jen iom pri la ideo:

1 Dum la festivalo vi povas elekti lingvon inter ĉ. 3 aliaj, pri kiu vi volas havi iom pli da informoj. En rondo vi lernu frazon, la prononcon kaj vi ricevu kelkajn informojn pri tiu lingvo. Ankaŭ eblas dum tiu tempo ricevi iom da informoj pri la kulturo ligita al la lingvo.

2 Tiun elekton vi povas fari dum ĉiu periodo de 40 minutoj kiam okazas la lingvaj rondoj en diversaj ĉambroj. Vi nur povas elekti unun inter tiuj. Eble dum sekvonta periodo de 40 minutoj vi havos eblecon elekti tiun, kiu vi maltrafis antaŭe.

3 La rondoj okazos la tutan sabaton kun paŭzoj. Eble ni daŭrigos dimanĉon se estos granda intereso.

4 Okazos ankaŭ lunĉo kaj tagmanĝo dum kiuj vi estas regalataj al manĝaĵoj de la diversaj kulturaj organizaĵoj kiuj partoprenos.

5 Vespere okazos distraĵoj. Muzikgrupo invitas vin al danco. Ni regalas vin al kavalkado de ritma muziko de

diversaj kulturoj. Ni jam certas ke la jenaj lingvoj estos prezentotaj: La aramea, la kurda, la persa, la nepala, la somala, la hispana, esperanto. Ni ankaŭ esperas pri la jenaj: La suomi, la dana, la rusa, la pola, la svahila. Se vi havas proponon pri iu ne tiel konata lingvo kaj scias kiu volas ĝin prezenti bonvolu tion anonci al Wim.

Wim Posthuma

Ingemar Nordin i SvD

Den 24/7 fick Ingemar Nordin tillfälle att berätta om esperanto i Svenska Dagbladet. Han ger då lite bakgrund till sitt eget intresse för språket. "Första gången som Ingemar kom i kontakt med esperanto var när han var 15 år, år 1929. Då kom det ett ombud från Svenska Esperantoförbundet hem till Ingemars hemby Munkeryd i Värmland. Lokalen var fullsatt, och Ingemar var förstås där.

– Ombudet kom när jag var precis i den åldern då man brottas som värst med tyskan och franskan och krånglig grammatik. Det var le, la och les och starka och svaga verb. Jag blev självklart väldigt intresserad när jag förstod att det fanns ett språk där det bara är en bestämd artikel, och som har en helt regelbunden verböjning.

Ingemar bestämde sig raskt för att lära sig esperanto och köpte med sig en bok från föreläsaren. Den kostade tio öre.

– Och så köpte jag en brevkurs som kostade en krona.

Sedan dess har Ingemar ägnat delar av sina somrar och andra lediga stunder åt esperanto. Det har blivit åtskilliga resor, kongresser, vänner och studiecirklar genom åren. Under andra världskriget skickade han skor, kläder och torrmat till lidande esperantister i östländer, och genom åren har han korresponderat med mängder av esperantovänner i hela världen.

– Jag har flera pärmar med korrespondens."

Nordin nämner också sin sambo Margit som han har esperanto att tacka för:

"Hon dök upp på Mosebacke torg för att lära sig esperanto för 15 år sedan. Och blev kvar.

– Ja, hon är verkligen det bästa jag har, säger Ingemar. Och hon är min bästa esperantokompis också. Vi övar ofta."

Artikeln ger också upplysning om var man hittar Ingemar Nordins egen brevkurs på Internet:

www.esperanto.se under fliken "lär dig".

Red.

PREETERE

MANIFESTO 2000

Se vi volas apogi la kulturon de paco kaj ne-perforto, vi povas subskribi la Manifeston 2000, lanĉitan de UNESCO, en la retadreso: www.uea.org/2000.html

STIPENDIUM

Västerås Esperantoklubb har fått av Ido-stiftelsen ett stipendium på 5 000 kr. VEK fick stipendiet för sina radio-program och sin språkforskning i samband med detta arbete.

(Ur La VEKa bulteno nr 2 2000)

SERĈANONCO

Ni renkontiĝis en Esperanto-Gården en Lesjöfors en septembro 1997. Ni havas komunan parencon. Kuzo via havas la saman familian nomon kiel mi, do Hannerz. Se vi legas tion, bonvolu kontakti min. Mi perdis vian nomon.

Sten-Anders Hannerz

Supersignoj

La ĉeĥa inspiris al Zamenhof

Unu el la okulfrapaj trajtoj de Esperanto estas la supersignitaj literoj, t.e. literoj kun diakritaj signoj. La supersignoj kaŭzis kaj kelkfoje daŭre kaŭzas problemojn, kiam oni skribas per skribmaŝinoj aŭ tekstoprilaboriloj sen tiuj literoj.

Krome la supersignoj devigas la manskribanton levi la krajonon pli ofte, sed tion oni ne povas tute eviti sen forigi la literojn latinajn i, j, q kaj x. Ĉu konsiderindaj malavantaĝoj aŭ ne, la supersignoj estis kaŭzo grava por la Ido-krizo en 1907-1908, kiam aperis reformita Esperanto sen la supersignoj.

Laŭ K. Kalocsay kaj G. Waringhien (Plena Analiza Gramatiko §3) la ĉeĥa lingvo influis d-ron Zamenhof pri la supersignitaj literoj, kvankam en la ĉeĥa la ĉirkaŭfleko estas renversita.

La ĉeĥa ĉ respondas al ĉ en Esperanto.

La ĉeĥa ŝ respondas al ŝ en Esperanto.

La respondeco estas ne nur la evidenta skriba, sed ankaŭ parola: la prononco de ĉ oni povas klarigi por ĉeĥo per la ĉeĥa ĉ, same kiel por franco per tch, por anglo per ch, por polo per cz kaj por svedo per ttj. Simile la fonemo de ŝ similas la ĉeĥan ŝ; kaj cetero la francan ch, la anglan sh, la polan sz kaj la svedan sj.

Se la ideo pri ĉirkaŭfleko venas de la ĉeĥa, tiu lingvo ne povas klarigi la aliajn ĉapelitajn literojn en Espe-

ranto; kvankam ĝi havas almenaŭ fonemon similan al tiu de ĵ en Esperanto, nome tiun de la ĉeĥa litero ž. Eble la franca ĵ influis.

La literon ĥ inspiris eble la germana ch (post a, o aŭ u).

La literon ĝ eble fontas en la angla g (ofte antaŭ e, i aŭ y).

La literon ŭ oni ja ĉefe uzas en diftongoj, kaj la rolon de ŭ ludas en aliaj lingvoj, ekzemple la sveda, ofte u. La litero verŝajne devenas latinon.

Ĉu la literoj supersignitaj de Esperanto nur troviĝas en la Internacia Lingvo? Ne ĉiuj; ĝ estas litero ankaŭ en la cimŝiana^o (Nordamerika lingvo); ŭ ankaŭ en latino, la irokeza, la buluba-lulua^o (Afrika lingvo) kaj la pima^o (Nordamerika lingvo). Sed kutime estas vokaloj kiuj estas ĉapelitaj, super la konsonantoj aperas la renversitaj ĉirkaŭflekoj.

Ĉu multaj strangajoj en Esperanto?

Eĉ en la 1990-aj jaroj, kiam jam de longe ni konatiĝis kun lingvoj ekster la ĝermanaj kaj romanaj oni povas legi de kelkaj aŭtoroj ke Esperanto donas strangan impreson:

"Esperanto ... gör för de flesta ett konstgjort intryck med sina många bisarra drag." ("Esperanto ... donas al la plejmulto artefaritan impreson per siaj multaj bizaraj trajtoj." El *Vad är interlingua*, Bertil Palmquist, 1996, p. 7).

Ĉu la ses supersignitaj literoj de Esperanto estas nekutime multaj aŭ eĉ la plej multaj el inter lingvoj kun alfabetoj latindevenaj? La respondo al tiu lasta demando estas senhezite ne! Troviĝas lingvoj kun fonemaroj superantaj tiun de Esperanto pluroble, kaj sekve bezonantaj amason da signoj aldonaj.

Ekzemple la menciita cimŝiana enhavas ne nur la literon ĝ kun diakrita signo, sed ankaŭ ā ā̄ ā̇ ā̈ ā̉ ā̊ ā̋ ā̌ ā̍ ā̎ ā̏ ā̐ ā̑ ā̒ ā̓ ā̔ ā̕ ā̖ ā̗ ā̘ ā̙ ā̚ ā̛ ā̜ ā̝ ā̞ ā̟ ā̠ ā̡ ā̢ ạ̄ ā̤ ḁ̄ ā̦ ā̧ ą̄ ā̩ ā̪ ā̫ ā̬ ā̭ ā̮ ā̯ ā̰ ā̱ ā̲ ā̳ ā̴ ā̵ ā̶ ā̷ ā̸ ā̹ ā̺ ā̻ ā̼ ā̽ ā̾ ā̿ ā̿̄ ā̿̅ ā̿̆ ā̿̇ ā̿̈ ā̿̉ ā̿̊ ā̿̋ ā̿̌ ā̿̍ ā̿̎ ā̿̏ ā̿̐ ā̿̑ ā̿̒ ā̿̓ ā̿̔ ā̿̕ ā̖̿ ā̗̿ ā̘̿ ā̙̿ ā̿̚ ā̛̿ ā̜̿ ā̝̿ ā̞̿ ā̟̿ ā̠̿ ā̡̿ ā̢̿ ạ̄̿ ā̤̿ ḁ̄̿ ā̦̿ ā̧̿ ą̄̿ ā̩̿ ā̪̿ ā̫̿ ā̬̿ ā̭̿ ā̮̿ ā̯̿ ā̰̿ ā̱̿ ā̲̿ ā̳̿ ā̴̿ ā̵̿ ā̶̿ ā̷̿ ā̸̿ ā̹̿ ā̺̿ ā̻̿ ā̼̿ ā̿̽ ā̿̾ ā̿̿ ā̿̿̄ ā̿̿̅ ā̿̿̆ ā̿̿̇ ā̿̿̈ ā̿̿̉ ā̿̿̊ ā̿̿̋ ā̿̿̌ ā̿̿̍ ā̿̿̎ ā̿̿̏ ā̿̿̐ ā̿̿̑ ā̿̿̒ ā̿̿̓ ā̿̿̔ ā̿̿̕ ā̖̿̿ ā̗̿̿ ā̘̿̿ ā̙̿̿ ā̿̿̚ ā̛̿̿ ā̜̿̿ ā̝̿̿ ā̞̿̿ ā̟̿̿ ā̠̿̿ ā̡̿̿ ā̢̿̿ ạ̄̿̿ ā̤̿̿ ḁ̄̿̿ ā̦̿̿ ā̧̿̿ ą̄̿̿ ā̩̿̿ ā̪̿̿ ā̫̿̿ ā̬̿̿ ā̭̿̿ ā̮̿̿ ā̯̿̿ ā̰̿̿ ā̱̿̿ ā̲̿̿ ā̳̿̿ ā̴̿̿ ā̵̿̿ ā̶̿̿ ā̷̿̿ ā̸̿̿ ā̹̿̿ ā̺̿̿ ā̻̿̿ ā̼̿̿ ā̿̿̽ ā̿̿̾ ā̿̿̿ ā̿̿̿̄ ā̿̿̿̅ ā̿̿̿̆ ā̿̿̿̇ ā̿̿̿̈ ā̿̿̿̉ ā̿̿̿̊ ā̿̿̿̋ ā̿̿̿̌ ā̿̿̿̍ ā̿̿̿̎ ā̿̿̿̏ ā̿̿̿̐ ā̿̿̿̑ ā̿̿̿̒ ā̿̿̿̓ ā̿̿̿̔ ā̿̿̿̕ ā̖̿̿̿ ā̗̿̿̿ ā̘̿̿̿ ā̙̿̿̿ ā̿̿̿̚ ā̛̿̿̿ ā̜̿̿̿ ā̝̿̿̿ ā̞̿̿̿ ā̟̿̿̿ ā̠̿̿̿ ā̡̿̿̿ ā̢̿̿̿ ạ̄̿̿̿ ā̤̿̿̿ ḁ̄̿̿̿ ā̦̿̿̿ ā̧̿̿̿ ą̄̿̿̿ ā̩̿̿̿ ā̪̿̿̿ ā̫̿̿̿ ā̬̿̿̿ ā̭̿̿̿ ā̮̿̿̿ ā̯̿̿̿ ā̰̿̿̿ ā̱̿̿̿ ā̲̿̿̿ ā̳̿̿̿ ā̴̿̿̿ ā̵̿̿̿ ā̶̿̿̿ ā̷̿̿̿ ā̸̿̿̿ ā̹̿̿̿ ā̺̿̿̿ ā̻̿̿̿ ā̼̿̿̿ ā̿̿̿̽ ā̿̿̿̾ ā̿̿̿̿.

Eŭropaj lingvoj

Ĉu tamen Esperanto estas lingvo kiu havas pli da "strangaj literoj" ol eŭ-

ropaj lingvoj, kun malnovaj latindevenaj alfabetoj? En la portugala alfabeto ni trovas la literojn ā ç õ, do malpli da "strangajoj" ol en Esperanto. Sed tio ne signifas ke la portugala malhavas aliajn diakritajn signojn, nur ke oni ne difinas ilin apartaj literoj. Kutime oni rigardas la akcentsignojn, tremaojn kaj ĉirkaŭflekojn kiel aldonajn al la ordinaraj literoj. En la portugala povas aperi ā á à â ã ä å Æ Ç È É Ê Ë Ì Í Î Ï Ó Ō Ū Ŭ Ÿ. Do, la portugala laŭ alia difino havas dek kvin literojn kun diakritaj signoj. Rimarku ke ne temas pri fremdvortoj ne asimilitaj al la lingvo kiuj prezentas la "strangajn literojn", sed ordinaraj vortoj kiel balão (balono), triângulo (triangulo), trás (malantaŭ), às (je), praça (placo), têxtil (tekstila), género (speco), tibia (tibia), pôr (meti), cómico (komika) kaj túnel (tunelo).

Ofte la diakritaj signoj estas nepraj por distingi du vortojn kiuj sen diakritaj signoj estus identaj, aŭ por indiki specifan prononcon. Do ne temas pri ornamaĵoj.

En kelkaj lingvoj oni tamen ne multe vidas diakritajn signojn, ekzemple en la angla. Sed tiu lingvo heredis dum longa tempo vortojn de la franca kelkfoje retenante la fremdaĵojn, ekz. en vortoj kiel fiancé (fianĉo), à la carte (laŭ la karto), entrecôte (interripaĵo), manœuvre (manovro), entr'acte (interakto), maître d'hôtel (hotelmastro) kaj tête-à-tête (duopa renkontiĝo).

Alternativoj pri Esperanto

Laŭ la Fundamento de Esperanto oni rajtas anstataŭigi la ĉirkaŭfleksajn literojn per la litero h tuj post la ĉapelita litero, t.e. ch gh hh jh sh anstataŭ ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ kiam oni malhavas la litertipon. La renversitan duoncirklon super u, oni rajtas tiaokaze tutsimple neglekti. Sed per la evoluo de la komputila tekniko tiu problemato verŝajne malaperos, ankaŭ rilate retan komunikadon.

Ankaŭ Esperanto evoluas, kaj la litero ĥ ofte estas anstataŭigita per k, ekz. en la vortoj tekniko anstataŭ tehniko, aŭ kirurgo anstataŭ hirurgo. Sed ne estis aprobita en la Fundamento (escepte de laŭ postaj komentoj), kaj kelkfoje ne taŭgas pro konfuzo. Tiel ekzemple holero estas mal sano, sed kolero estas sento. Alternativo estas kolerao.

Jan Setréus

PRETERE

NUN EN WAP

La novaĵbulteno NUN estas nun legebla ankaŭ en WAP-telefonoj. La mallongaj novaĵoj de NUN tre bone taŭgas por la medio, opinias Aaron Irvine, kiu teknike aranĝis la solvon. Havantoj de WAP-telefonoj uzu la adreson <http://lingvo.org/gast/nun.wml> por legi la plej lastajn novaĵojn el la esperanto-mondo. En kelkaj modeloj la esperanto-literoj aperas tute korekte. Ne-havantoj de tiaj telefonoj povas rigardi simuligon sur sia ordinara ekrano. La reteja adreso de tiu simuligo estas <http://trix.cellmania.com/wapster/cgi-bin/php/simulator.htm?url=http://lingvo.org/cgi-bin/gast/nun.pl>. (El NUN)





KORESPONDO

Baltmaraj Esperanto-Tagoj en Tallinn

Flegistino de Murmanko deziras korespondamikon en Svedio. Ŝi ŝategas Svedion kaj ĝian trankvilan popolon. Ŝi havas 44 jarojn kaj estas vidvino de maristo. Ŝi tamen ŝategas la maron, promenojn en la arbaro, kultivadon de floroj, vojaĝojn, skiadon, librojn k.t.p.

Tatjana Sisojeva
Kelskij Prospekt
133-19
183052 Murmansk
Rusio

Matenmanĝo en Villa Volge, Tallinn. Fotis Mikael Blind

Ni estis 11 svedaj esperantistoj kiuj partoprenis BET en Tallinn la unuan semajnon en julio. De la stokholma esperantoklubo ni estis Birgit, Nils-Erik, Kerstin, Hans, Mikael, Gunvor, mi kaj Bengt de Tyresö. Ankaŭ estis Kerstin Rhodin kaj Harold Brown el Smolando kaj Gunnar Olsson el Skövde. Entute estis preskaŭ 200 partoprenantoj el Pollando, Litovio, Finnlando, Latvio, Estonio, Norvegio, Danio, Hispanio, Francio kaj Rusio. Programestroj estis la bonkora Aŭgust Kilk el Vösu kaj la spirita Valev Kruusalu el Tallinn kiuj prezentis la diversajn programojn kaj prelegojn. Ili ankaŭ gvidis busekskursojn kaj promenadon tra la malnova urbo. Vespere estis muziko, danco kaj kantado kie la ĉeestantoj ankaŭ partoprenis. Mi estas tre kontenta kun mia unua BET kiu estis tre bone organizita. Ĝis revido en Kaunas, Litovio en julio venontjare! Mi esperas ke pli multaj svedaj esperantistoj partoprenos kaj vidos kiom da interesaj aferoj oni povas travivi en niaj najbaraj landoj en oriento.

Birgit kaj mi vizitis Helsinko survoje hejmen. Ni loĝis en la ejo de Esperanto-Asocio de Finnlando meze de la



urbo. Estas loĝejo de unu ĉambro kaj kuirejo, kie la asocio havas sian oficejon kaj la Esperanto-klubo de Helsinko havas siajn mardajn kunvenojn kaj kie gastoj povas tranokti je malalta prezo. Nin vere impresis la belega ejo kiun la finnaj esperantistoj posedas dank' al hereditaj monoj de sindonaj esperantistoj. Ni esperus ke ankaŭ ni svedaj esperantistoj havus eblecon aĉeti propran ejon por SEF kaj la stokholma klubo kie gastoj el eksterlando kaj Svedio povus tranokti. Tiucele ni rekomendas ĉiujn esperantistojn sen propraj infanoj pensi pri la esperantomovado en sia testamento.

Soile Lingman

Rezolucio de la 1-a Seminario por Arabaj Esperantistoj

Por plenumi la celojn de Esperanto necesas alfronti konfliktojn kaj antaŭjuĝojn kaj utiligi la lingvon por krei kondiĉojn de paco kaj kompreniĝo.

Tiucele ni, partoprenantoj de la 1-a Seminario por Arabaj Esperantistoj en Amano, Jordanujo, de la 22-a ĝis la 24-a de julio 2000, diskutinte pri la temo "Tutmondigo kaj la arabaj landoj", proponas al la membraro de UEA la jenajn realigindajn punktojn:

- 1) UEA okupiĝu pri disvastigo de Esperanto precipe en landoj, kie ne ekzistas lokaj fortoj;
- 2) Niaj fortoj estas limigitaj kaj sekve ni koncentru nian agadon ĉefe (kvankam ne ekskluzive) je unu-du el la arabaj landoj. Parto de nia celo estu krei en tiuj landoj arabajn esperantistojn kapablajn siavice disvastigi la lingvon en pliaj arabaj landoj;
- 3) Jordanujo kiel facile alirebla lando kun favoraj kondiĉoj estu unu el tiuj landoj;
- 4) Komencaj paŝoj estu:
 - a) pretigo de taŭgaj arablingvaj inform-materialoj;
 - b) organizado de kurso en Jordanujo per utiligo de lokaj fortoj kaj internacia helpo;
 - c) komunikado kun universitatoj en la koncernaj landoj cele al organizado de komunik-reto kaj eventuale de kunveno de fakuloj pri lingvaj kaj kulturaj problemoj kun internacia partopreno por i.a. informi la fakulojn pri la valoro de Esperanto kiel universita-

ta stud-objekto;
ĉ) konversacioj inter la Araba Komisiono de UEA kaj israelaj esperantistoj pri la manieroj laŭ kiuj ili povus helpi en tiu ĉi iniciato.

Amano, la 24-an de julio 2000

Edukado de Esperanto-instruistoj

En Poznan, Pollando, la konata Ilona Koutny (origine el Budapeŝt, nun ŝi loĝas en Poznan kun pola edzo) sukcesis fondi universitatan edukadon pri esperanto por nunaj kaj estontaj esperanto-instruistoj. Sed urĝas sendi studentojn al ŝi. La nombro de studentoj de esperanto malkreskas. Estas risko, ke oni ĉesigos ŝian instruadon. En majo tiun ĉi jaron mi vizitis Pollandon kaj aŭdis prelegon de ŝi pri ŝia agado.

Sian universitatan agadon de esperanto en Poznan ŝi komencis kun la espero altigi la kompetenton kaj prestiĝon de la esperanto-instruistoj. Al ŝiaj kursoj estas bonvenaj ĉiuj sinceraj potencialaj instruistoj. En la lernejoj ĉiuokaze en la industria mondo, certe oni ne akceptas neprofesiajn instruistojn ekzemple de la angla lingvo. Por ke esperanto estu same egalvalora lingvo al la naciaj lingvoj en la lernejoj, multe gravas la edukado de la esperanto-instruistoj.

La adreso al ŝi tekstas jene:
Koutny Ilona
Adam Mickiewicz Universitato
Lingvistika Instituto
Miedzychodska 5
PL-60-371 Poznan
Pollando
ikoutny@hum.amu.edu.pl

Kerstin Kristoferson

Projekto Euroscola

Dum UEA/ILEI/TEJO kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio ankoraŭ estas redaktantaj siajn planojn por partopreno de esperantistoj en la Eŭropa Jaro de la Lingvoj 2001, niaj francaj samideanoj iniciatis jam subprojekton, al kiu mi petas vin doni atenton.

Temas pri kunvenigo al la Eŭropa Parlamento en Strasburgo de liceanoj (lernantoj inter la aĝo 15 kaj 18), apartenantaj prefere al unu-du lernejoj klasoj (maksimume 30 lernantoj

DONACIOJ

FONDUSO DE M. ANDREASSON
Sveda Esperanto-Federacio 500 kr
Gunilla Sundholm, Västerås 200 kr
Dag Ellard, Ljungby 200 kr
Akiko kaj Keiko Snarberg, Jönköping 200 kr

MEMORE AL M. ANDREASSON
Anita Dagmarsdotter, Krylbo 100 kr
Lisbet kaj Bertil Andreasson, Hörby 200 kr
Inga Nothfalk, Hässelby 100 kr
Alice kaj Nils Johansson, Norrköping 100 kr

MEMORE AL JAN STRÖNNE
Anita Dagmarsdotter, Krylbo 100 kr
Alice kaj Nils Johansson, Norrköping 100 kr

MEMORE AL JAN STRÖNNE KAJ M. ANDREASSON
Alice och Nils Johansson 200 kr
MEMORE AL JOHN BROMAN
Inez kaj Lennart Lagerkrantz, Falun 200 kr

RONDO LANGLET
Wim Posthuma, Västerås 200 kr
CETERE
Leif Nordenstorm 200 kr

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj donacoj estas bonvenaj al poŝtĝiro de SEF 2012-3. Ankaŭ regulaj donacoj en Rondo Langlet oni povas aranĝi sammaniere.

SEF tute dependas de donacoj. La membrokotoj tute ne sufiĉas por la agado.

por ĉiu lando) kaj kapablaj diskuti en Esperanto kun la lernantoj de aliaj landoj pri eŭropaj problemoj.

Tio okazos en la kadro de renkontiĝoj inter lernejoj kaj parlamentanoj, kiuj okazas ĉiu-jare sub la nomo Euroscola. Ili ne nur diskutos, sed ankaŭ aŭdos prelegojn kaj partoprenos komunajn ludojn. La Eŭropa Parlamento mem pagos la vojaĝon kaj tre verŝajne la restadkostojn. La vizito devos okazi komence de majo ventontjare.

Demandojn kaj pretecojn partopreni sendu al
Philippe Bérizzi
pberizzi@esperanto.org

(El Ret-info/Eventoj)

Iom pri la muzikgrupo Asorti

La kerno de tiu grupo estas la familio Pishchikas el Litovio. Patro Edvardas (Edvard), patrino Jelena (Elena) kaj filo Edgaras (Edgar). La artista nomo estas Asorti kiu signifas sortimento. Nun ne temas pri kolekto da specimenoj da varoj, sed pri kolekto da muzikaĵoj kaj muzikistiloj. Alivorte: muziko por ĉies gusto kaj cirkonstancoj. Depende de tio, nur Elena kaj Edvard muzikas aŭ la tuta familia trio. Aŭ, kune kun aro da infanoj.

Dum la kongreso de SEF en Helsingborg kvar Asortianoj prezentis sin entute. Ĉi-foje Edgar bedaŭrinde ne povis partopreni pro ekzamenaj taskoj. Dum la prezentado de Asorti en Helsingborg, la muzikgrupo ne ĉiam estis kvarope, kelkfoje unuope, duope aŭ triope. Montriĝis, ke ili tre rapide povas ŝanĝi sian repertuaron kaj prezenti sian novan muzikon.

Ni daŭre ŝatas aŭskulti la muzikon, kiun ni aŭdis dum ilia prezentado dum la UK en Tampere. Sed ne ĉi tiun fojon.

Elena kaj Edvard komencas ludi publike en 1992. Poste, la grupo multe koncertis dum internaciaj festivaloj en Germanio, Belorusio, Litovio, Hungario, Belgio, Pollando, Ĉeĥio, Latvio kaj Finnlando (la UK en 1995). En Svedio estis nova sperto, ĉar tiam ne okazis festivalo, sed kongreso kun jar-kunveno, diskutoj kaj prelegoj.

Ni bone memoras Edgar, tiam 10 jara, kiam li ludis la violonon en Tampere kaj kantis. Nun aktive praktikas gitaron kaj havas propran grupon.

Elena kaj Edvard ankaŭ okupiĝas pri filmado, kaj muzikregistrado. Pro tio la familio posedas sonstudion ek de 1995, kie ĉiuj esperantistoj povas realigi siajn muzikajn ideojn.

Krome ili kopias, ciferigas muzikon, kaj produktas kompaktdiskojn.

Ekde 1997 ekzistas Esperanto-telestudio, kiu produktas filmojn pri Esperanto-aranĝoj kaj muzikajn videofilmojn. Ekzemplo de tio estas filmo pri la Printempa Semajno Internacia en Germanio.

Elena kaj Edvard ofertas al vi multe da helpo, kompreneble kontraŭ pago por ilia porvivo, ekz. koncerne vian enarkivigadon de videomaterialo.

Asorti jam eldonis tri muzikkasetojn kaj preparas kompaktdiskojn.

Wim Posthuma

Zamenhof plej fama bjalistokano de la 20-a jarcento

Laŭ la informoj, kiujn oni skribis la 21-an de julio en la pola taggazeto Gazeta Wyborcza (region-eldono en Bjalistoko) dum la pasintaj monatoj oni organizis en Bjalistoko plebisciton je la temo "Bjalistokano de 20-a jarcento". Organizis ĝin Gazeta Wyborcza, Radio Bialystok, Telewizja Bialystok. La organizantoj volis sciigi, en la lastaj monatoj de la pasinta jarcento, kiu el la ekaj kaj nunaj anoj de la urbo plej promociis kaj famigis la urbon. Kiu el ili, per sia vivo kaj atingoj plej multe aldonis al komunaj akiraĵoj de la urbo, al la akiraĵoj de kelkaj generacioj. Venis miloj da respondoj kaj centoj da proponoj. La organizantoj preparis el la proponoj la liston de 50 plej popularaj personoj. Post kelkmnata prezentado en amaskomunikiloj estis prezentita la listo laŭ la voĉdonoj.

- 1 Ludoviko Zamenhof 6337 voĉoj – kreinto de la internacia lingvo.
- 2 Jerzy Maksymiuk 3433 voĉoj – fama pola muzikisto kaj orkestr-estro.

...
20 Jakub Szapiro 335 – esperantisto kaj esperanto-movadano.

Por la esperantistoj estas granda goĝo, ke Zamenhof estas la plej konata persono en la urbo kaj regiono de sia naskiĝo.

Gratulojn vi povas sendi al:

Urząd Miejski w Białymstoku
15-028 Białystok
ul. Slonimska 1
Pollando

tel. 00-48-85-7329325
fakso: 00-48-85-7414324/7327601
bpm@city.bialystok.pl
www.city.bialystok.pl/espera.htm

Stanislaw Mandrak

Vojaĝo per Esperanto

Ni jam antaŭe povis legi (La Espero 1998:5-6 p.13) pri ĉeĥaj Esperanto-infanoj vojaĝantaj eksterlanden. Ilia instruistino nun rakontas pri ĉi-jara vojaĝo al Hungario.

Nia infana Esperanto-grupeto estis invitita de Patro Lajos Kóbor, vicprezidanto de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)...

En Sopron jam atendis nin Patro Lajos. Tri el ni kaj ĉiujn valizojn li veturigis per propra aŭtomobilo, kvin li sendis kun hungara Esperantistino per buso al Pereszteg. Tie oni loĝigis nin en paroĥa domo kaj donis al ni bonan vespermanĝon.

La 11-an de junio, dimanĉe, ni ĉeestis sanktan meson je la deka en la preĝejo kontraŭ paroĥa domo. Tie estis ĝuste granda soleno. Patro Lajos baptis malgrandan Silvestron el familio, kies tri gefiloj akolititis. Poste ni jam volis nur kun la knabinoj ekzerci dancojn kaj programerojn, ĉar la knabinoj neniam kune dancis kaj ludis loĝante en diversaj lokoj.

Sed Patro Lajos veturigis nin en Nagycenk, en muzeon, kastelon kaj mauzoleon de grafo István Széchenyi mortinta en la jaro 1870, kiu multe faris por Hungario. Patro Lajos eĉ montris al ni preĝejon kun orgeno el operdomo en Vieno kaj sian alian paroĥan domon en Nagycenk. En la mauzoleo ni miris pri multaj rubandoj en naciaj koloroj. Tio estis donacetoj de dankemaj vizitantoj el diversaj lokoj de Hungario.

Post reveturo ni diligente ekzercis ĝis noktaj horoj. En ĝardeno ni vespere renkontis kun la vespertoj.

Lunde la 12-an de junio la knabinoj ludis antaŭ sankta meso pantomimon pri Bono kaj Malbono. Ilia nombro estis malgranda, ili devis eĉ "prunti" hungarajn infanojn. Mia amikino Lida faris avinon, mi batitan ĉevalon kaj forŝtelitan fotiston. Al la homoj la ludo verŝajne plaĉis. Unu virino min karesis, kiam mi eliris el la preĝejo. Posttagmeze la knabinoj dancis, montris kutimojn kaj ludis fabelojn en la kulturdomo (Falúház). Ni eĉ disdonis propramane faritajn marcipanojn, kaj virinoj petis de ni recepton por baki. Malgrandaj knabinoj el religia instruado de Patro Lajos kantis al ni belege Esperanto-kanton Merkrede la 13-an ni ellitiĝis frumatene. Ni trarigardis urbon kaj la knabinoj aĉetis donacetojn hejmen. Je la deka ni jam estis en eklezia lernejo kaj preparis prezentadon.

Zdenka Novotna
Na Strouze 1720
560 02 Česka Trebova
Ĉeĥio

Eŭropa jaro de lingvoj

PRETERE

NIA LINGVO EN INTERRETO

La entrepreno Netscape havas retpaĝaron kun la nomo DMOZ, en kiu aperas ligiloj al ĉiulingvaj retpaĝoj (escepte de la angla). La 29-an de marto, Esperanto havis en tiu paĝo 1 015 ligilojn, ĝuste apud la dana, kun 1 010. Ŝajnas bona pozicio, se oni konsideras la ligo-kvanton de gravaj lingvoj kiaj la franca (17 006) aŭ la hispana (30 409). La nombroj varias ĉiutage. Eblas viziti la paĝon ĉe: <http://dmoz.org/World/>

Dario Rodriguez
(El Eventoj
n-ro 186)

Konsilio de Eŭropo, en kiu membras preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj kiu estas konata pro sia okupiĝo pri homaj rajtoj, kaj Eŭropa Unio deklaris la jaron 2001 Eŭropa Jaro de Lingvoj.

La du eŭropaj organizaĵoj strebas progresigi instruadon de lingvoj kaj levi la konscion de la granda publiko pri la valoro de lingva plureco en Eŭropo. Krom vasta informkampanjo, uzanta specialajn simbolojn kaj fraz-frazojn, oni organizos amason da eventoj sur ĉiuj niveloj: tuteŭrope, plurlande, nacie kaj loke.

UEA subtenas la iniciaton de la eŭropaj organizaĵoj. La celoj de la Eŭropa Jaro de Lingvoj kongruas kun tiuj de la Esperanto-movado, al kiu ĝi donos okazon diskonigi siajn lingvo-politikajn celojn. Eĉ se la jaro formale celas nur la lingvojn "rekonitajn de la membroŝtatoj" ĝi ja ebligas partoprenon ankaŭ de Esperanto-organizaĵoj per projektoj kongruaj al la celoj de la jaro. Krome oni povas antaŭvidi, ke ĵurnalistoj k.a. interesitoj ne limigos sin nur al la ŝtataj lingvoj sed povos interesiĝi ankaŭ pri la situacio de Esperanto kaj la perspektivoj por ĝia pli vasta uzo en Eŭropo.

La Jaro de Lingvoj prezentas ŝancon al agado por antaŭenigi la celojn

de Kampanjo 2000, t.e. plialtigi la prestiĝon de la internacia lingvo, influu la internacian vivon, kaj levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-movado. La jaro ricevos atenton i.a. en la traktado de la kongresa temo de la Zagreba UK, "Kulturo de dialogo — Dialogo inter kulturoj" kaj en la eldona agado de UEA, t.e. revuoj kaj libroj. Landaj asocioj devus atenti ĝin en siaj aranĝoj kaj eldonaĵoj, kaj klopodi kiel eble plej multe kunlabori kun ne-esperantistaj asocioj kaj fakuloj.

Por evoluigi ideojn pri la esperantista kontribuo al la jaro, estas formiganta kunaganta grupo kiun kunordigas

Anna Ritamäki
Dragsfjärdsvägen 690
FI-25700 Kimito
Finnlando
anna.ritamaki@kolumbus.fi
tel. 00-358-2-423146
fakso 00-358-2-423246

Oficialaj informoj troviĝas i. a. ĉe:
<http://europa.eu.int/comm/education/languages/actions/year2001.html>
(anglalingva kun ligo al alipaĝaj versioj)

<http://culture.coe.fr/infocentre/press/eng/2000/epress2000.04.03.html>
(gazetara komunikado de Konsilio de Eŭropo)

UEA 17/7 2000

Subvencio Cigno

Ekde 1994 la Estraro de UEA asignas Subvencion Cigno al projekto, kiu kontribuas al disvastigo de Esperanto en la Tria Mondo. La subvencio financas la japanan esperantiston Etsuo Miyoshi kaj ĝi valoras 500.000 japanajn enojn (ĉ. EUR 4.900).

La ĉi-jaran subvencion ricevis la projekto Indiĝenaj Dialogoj, lanĉita antaŭ du jaroj kun la celo krei komunikan reton inter organizaĵoj de indiĝenaj popoloj per la uzo de interreto kaj Esperanto. Tiu ĉi komplete novspeca projekto estas ne nur unu el la plej kuraĝaj sed ankaŭ unu el la plej sukcesaj Esperanto-riĵataj projektoj de multaj jaroj. Ĝi ne estas movada projekto, ĉar la disvastigo de Esperanto ne estas ĝia celo sed rimedo por realigi la celatan komunikan reton. La projekton iniciatis ges-roj Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge el Nederlando. Kadre de ĝi okazis jam du kursoj en Nederlando kaj regionaj kursoj en Barato, Kostariko, Burkina Faso kaj Rusio (Komilando). UEA auspicias la projekton ekde la komenco.

(El Gazetaraj komunikoj
de UEA no 90)

Esperantostroj

Laŭ la decido de la Urba Konsilantaro en Gliwice, post la propono de loka Filio de PEA [Pola Esperanto-Asocio], la 29-an de junio 2000 oni decidis nomigi du novajn stratojn en la kvartalo al "Pacdefendantoj" per la nomoj:

Antoni Grabowski
Odo Bujwid

Post la ĝis nun jam du ekzistantaj esperantaj stratoj str. L. Zamenhof kaj str. Esperantystow (Esperantistoj), Gliwice estas laŭ niaj informoj la unua en la mondo urbo kiu havas kvar stratojn ligitajn kun esperanto.

Vi povas sendi Viajn gratulojn al urbaj instancoj

biuro_prasowe@um.gliwice.pl
aŭ

Zarząd Miasta
str. Zwycięstwa 21
44-100 Gliwice
Pollando

Mandrak Stanisław



PRETERE

LITEROFTECO

La ofteco de la literoj en Esperanto laŭ studo farita de Otto Haszpra (Hungario), profesoro de la Budapeŝta Teknika Universitato, kiu ekzamenis tekstojn kun ensume 496 196 literoj. La relativa ofteco de Esperanto-literoj estas:

a = 12,6 %
e i o = 9,0 %
n = 7,8 %
l = 6,2 %
r s = 5,9 %
t = 5,5 %
k = 4,2 %
u = 3,4 %
d m = 3,05 %
p = 2,8 %
j = 2,7 %
v = 1,9 %
g = 1,3 %
h = 1,2 %
f = 1,1 %
c = 0,8 %
ĉ ĝ = 0,7 %
z h ŭ = 0,5 %
ŝ = 0,2 %
ĵ = 0,1 %

Otto Haszpra
haot@freemail.hu

(El *Eventoj* no 190)

20-jara jubileo de la Raŭma Manifesto

Antaŭ precize 20 jaroj, la 31-an de julio 1980 kelkdeko da gejunuloj lanĉis kadre de la tiujara IJK en la finna urbo Raŭma dokumenton, poste nomata Raŭma Deklaracio. Malgraŭ la klopodoj de la iniciatintoj ĝi ne iĝis oficiala dokumento de la kongreso, nur tiu de la 106 subskribintoj.

Motoro de la preparado estis Valerio Ari (alie! Giorgio Silfer), la unuaj subskribintoj estis Jouko Lindstedt kaj Amri Wandel.

La Raŭma Manifesto la unuan fojon deklaris publike la intencon ŝanĝi la celon de la E-movado, provis redifini la koncepton de esperantisteco, kaj publike rezignis pri la konkurenco al mondlingvoj kiel la angla.

La Deklaracio longajn jarojn estis sufiĉe prisilentata en la tiama organizita internacia movado, sed manpleno de aktivuloj pere de Literatura Foiro persiste laboris kaj laboras ankaŭ nun por ĝia diskonigo kaj realigo.

Multaj konataj subskribintoj de la deklaro hodiaŭ jam forlimigas sin de tiu ideologio, sed la LF-stabo (kaj la lastatempa Pakto por E-Civito) konsideras ĝin kiel gvida, baza ideologio.

Laŭ multaj aktivuloj por hodiaŭ la enhavo de raŭmismo signife ŝanĝiĝis kaj diferencas de la origina, ĝi reprezentas pli-malpli la idearon de Silfer.

Hodiaŭ fare de multaj ĝi estas konsiderata kiel "konsumisma esperantismo" (vi nur ĝuu kaj konsumu la E-kulturon, sed ne zorgu pri la disvastiĝo de la lingvo, ne zorgu pri la konkurenco al aliaj mondlingvoj, ktp.). Tio (kaj la personeco de Silfer) elvokis tre fortajn kontraŭstarojn inter la aktivaj esperantistoj, kiuj alternative vidas la vojon en aplikado de modernaj organizikaj kaj merkatakaj rimedoj por vivteni kaj disvastigi la lingvon.

20-a datreveno okazis rememora studseminaro en KCE [Kultura Centro Esperantista], Svisio, ĉefsidejo de raŭmismo, kiun partoprenis ankaŭ kelkaj el la iamaj subskribintoj de la Manifesto. Krome okaze de KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) okazis ankaŭ ronda tablo en Helsinko, kiun partoprenis i.a. Jouko Lindstedt, Sabira Ståhlberg kaj aliaj. Ankaŭ en la granda somera kunveno de E-gejunuloj Internacia Junulara Semajno, IJS en Hungario estas antaŭvidita prelego kaj diskutrodo pri raŭmismo okaze de la 20-jara jubileo, kiu dividis la movadon.

Laszlo Szilvasi
ĉefredaktoro de *Eventoj*
(El *Ret-info/Eventoj*)

Internacia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio

Sub la aŭspicioj kaj kun la subteno de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj la Akademio de Esperanto organizos internacian simpozion pri lingva planado kaj leksikologio, okazonta en Zagrebo, Kroatio, de la 28-a ĝis la 30-a de julio 2001. La laborlingvoj estos la kroata, esperanto, la angla kaj la franca.

Simpozio

La Iliria Halo de la Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, Opatička 18, HR-10 000 Zagrebo, Kroatio.

Kontribuoj

Ni bonvenigas sciencajn kontribuojn al la simpozio. Sendu vian tekston en elektronika formo al profesoro Geraldo Mattos, <mattos@super.com.br>, antaŭ la fino de novembro 2000. Escepte ni povas akcepti tekston en ne-elektronika formo, sed nur post antaŭa interkonsento kun profesoro Mattos kaj nur se ĝi alvenas al li ĉe Rua Dr. João Motter, 98, BR-81210-260 Curitiba PR, Brazilo, antaŭ la fino de oktobro 2000. Akceptitaj artikoloj estos publikigitaj en volumo kiu estos preta antaŭ la simpozio.

Partoprenado

Personoj kiuj deziras partopreni en la simpozio (eĉ sen prezento de iu verko) estas petataj informi profesoron Christer Kiselman, <kiselman@math.uu.se>, antaŭ la fino de majo 2001.

Papera adreso:
Poŝtkasto 480,
SE-751 06 Uppsala
Svedio

SEJU:s STYRELSE

Adressändring:

Vice ordförande:

Janko Luin
Skyttens gata 560
136 61 Haninge
tel. 08 - 745 12 87
janko@luin.nu

Sekreterare:

Jessica Hanmeier
Skyttens gata 560
136 61 Haninge
tel. 08 - 745 12 87
jessica@esperanto.se

NEKROLOGO

Regina Emson

Regina Emson, multjara UEA-delegito en Borås, mortis la 26-an de majo. Ŝi venis al Stokholmo kiel 18-jara estona junulino en la jaro 1930, la jaro de la granda stokholma ekspozicio. En la ŝipo inter Tallinn kaj Stokholmo ŝi konatiĝis kun la sveda esperantisto A. Emson. Kiel lia edzino Regina post kelkaj jaroj revenis al Svedio kaj transloĝiĝis al Borås kie ŝi vivis ĝis sia morto. La milito fermis la pordon al Estonio por longa tempo. Regina restis fidela al Esperanto dum tuta sia vivo kaj havis grandan korespondadon. Ŝi partoprenis multajn kongresojn, unu el la lastaj estis UK en Pekino en 1986.

Post la liberiĝo de Estonio ŝi denove povis viziti sian hejmlandon. La

unuan fojon mi renkontis ŝin fine de 80-aj jaroj en Estonia teatro en Tallinn. Dank' al nia komuna amiko Heino Pavelson, ni havis okazon konatiĝi, pro kio mi tre ĝojas. Poste ni renkontis unu la alian ĉiujare en printempo kiam mi faris kelkhoran viziton en Borås survoje al mia fratino en Varberg. Ankaŭ ĉijare mi faris viziton ĉe Regina fine de aprilo. Ŝi rekonis min, sed ne povis diri ion. Mi komprenis ke tio eble estas la lasta fojo kiam ni vidas unu la alian. Tiel estis. Post kvar semajnoj ŝi jam estis for. Mi ricevis la mesaĝon fine de julio de ŝia filo Regar.

Ripozu en paco, kara Regina!

Soile Lingman



Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

letero de la estraro

Kontaktuloj tra la lando

La estraro komencis ĝisdatigi la liston de personoj en diversaj lokoj en Svedio, kiuj pretas respondi al homoj, kiuj ekinteresiĝas pri esperanto kaj povas helpi ilin en iliaj unuaj kontaktoj kun la esperanto-movado.

En tiu listo estas nomoj de respondeculoj de diversaj kluboj, kie tiaj ekzistas, sed ankaŭ de unuopuloj en lokoj, kie ne ekzistas sufiĉe da membroj por havi klubon. En tiu listo estas nun jenaj lokoj:

Bergslagen	Kalmar	Skövde
Boden	Katrineholm	Stockholm
Dalarna	Krylbo	Sundsvall
Falköping	Kungälv	Södertälje
Göteborg	Lerum	Trelleborg
Halmstad	Linköping	Tyresö
Haninge	Lund	Umeå
Helsingborg	Malmö	Uppl. Väsby
Hällefors	Mellanskåne	Uppsala
Hässleholm	Norrköping	Västerås
Höör	Nybro	Årjäng
Jönköping	Oskarshamn	Örebro

Sed ekzistas esperantistoj en multe pli da lokoj. Se via loko ne troviĝas en la listo, ĉu vi povus mem fariĝi kontaktulo? Ni kompreneble esperas, ke tio donos al vi multe da laboro, ĉar tio signifus, ke ekzistas granda intereso pri esperanto en via loko.

La ĝisdatigitan liston ni aldonos al tiuj, kiuj petas informojn pri esperanto ĉe SEF, kun la celo, ke ili ankaŭ ekhavu personajn kontaktojn en sia propra loko. La listo aperas ankaŭ en la interreto ĉe la adreso <http://www.esperanto.se/klubbar/>.

Se vi anoncas vin kiel kontaktulo, skribu al SEF (adreso sur paĝo 2) kaj donu la jenajn informojn: nomo, kompleta adreso, telefona numero, faksonumero (se havebla) kaj retroŝta adreso (se havebla). Vi povas kompreneble ankaŭ sendi tiujn informojn retroŝte al sef@esperanto.se.

La interreta listo estas aranĝita tiel, ke ĉiu respondeculo povas mem ĝisdatigi la informojn. Ekzemple: se klubo ŝanĝas kontaktulon, ĝi povas mem registri la ŝanĝon. Kaj la solvo estas tiel inteligenta, ke mesaĝo estas sendita al SEF kun la ŝanĝo farita, tiel ke oni ne bezonas aparte informi la estraron pri tio. Tiel ankaŭ la presita listo povas facile esti ĝisdatigita. La samo validas ankaŭ por neklubaj kontaktuloj.

Kaj fine peto: se vi vidas iun eraron en la interreta listo, bonvolu informi la estraron pri tio. Tiel ni povas komune zorgi, ke la kontaktulisto estu ĉiam korekta kaj vere utila al ĉiuj, kiuj ekinteresiĝas pri esperanto.

NI PREZENTAS



Torun

Mi estas Torun Jansson, vic-sekretario de SEJU. Krome, mi ankaŭ estas prezidanto de la Esperanto-Societo de Uppsala. Mi estas 20-jaraĝa, kaj dum la aŭtuno laboros kiel instruisto, i.a.

kiel esperanto-instruisto ĉe Katedral-skolan en Uppsala. Krom lingvolernado kaj -uzado ankaŭ interesas min la naturo, legado, pentrado kaj aro de aliaj aĵoj.

Mi eklernis esperanton en 1991, kaj ekde tiam sufiĉe multajn esperanto-renkontiĝojn partoprenis, kvankam mi antaŭ ĉi-jaro ne aktivis en SEJU.

aŭtuna seminario

en Lesjöfors, la 11-an kaj 12-an de novembro

Gastprelegantoj:

Otto Prytz, *Universitato de Oslo*

"Analizo de la infinitivo en esperanto kaj ĝenerale"
"Johan Falkberget – norvega verkisto internacie koninda"

Jouko Lindstedt, *Universitato de Helsinko*

"Esperanto kiel familia lingvo"
Prelego decidota

Lars Forsman, *Altlernejo de Karlskoga*

kun la plej lastaj novaĵoj pri liaj kursoj

Distraĵoj kaj aliaj kunvenoj

Informoj kaj aliĝoj: Birger Viggen, tel. 08 - 612 58 51

Lennart Svensson, Esperanto-Gården, tel. 0590 - 309 09